

The
NORTH AMERICAN
ESPERANTO REVIEW



Rememoroj pri
Thomas A. Edison
• • •
Aventuroj de Bonesper

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Septembro - Oktobro • 1957

NI PETAS

KE ONI ATENTU LA ADRESON
DE LA REVUO

La adreso citita en la Jarlibro de UEA, 1957, estas malnova adreso de nia *literatura redaktoro*. Lia nuna adreso:

D.B.Richardson, 3412 North Mullen,
Tacoma 7, Washington, Usono.

La nuna adreso de la *Revuo* estas:

North American Esperanto Review
2116 North 35th St., Seattle 3, Wash.,
Usono.

The North American Esperanto Review

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *Secretary*: Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; *Treasurer*: Edward W. Pharo, Jr., 220 County Line Rd., Somerton 16, Pennsylvania.

Membership Dues: Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."

The North American Esperanto Review

(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

Vol. 5, No. 5.

Sept.-Oct., 1957.

The Review not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

La Revuo ne nur permesas, sed invitas, represon, escepte kie aperas speciala noto limiga pri kopiado.

CONTENTS (English)

Charles Powell	Page 1
Esperanto Vagabonds in Europe	3
Local Addresses	4
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto	Inside Back Cover
ENHAVO (Esperanta)	
Rememoroj pri T. A. Edison	Paĝo 2
Bonvolu Skribi	4, 10, 11, 13
Lokaj Adresoj	4
Historio	5
Trans la Lingvajn Barilojn	7
Esperanto en Norda Ameriko	8
Nia Literaturo	9
Aventuroj por kaj per Esperanto	10
Postenuloj de ELNA	11
Nova Enigmo	11
Pri "Televizio" kaj Internaciaj Vortoj	12
Paĝo de la kunludantoj	15
Por Rimistoj	16

NOTO: Korespondpetoj, kiuj aperas sub "Bonvolu Skribi", estas senpagaj. Por aliaj anoncoj aŭ reklamoj: ĝis sep linioj de unu kolono, \$1; pli ol sep linioj ĝis ¼-paĝo, \$5; ½-paĝo, \$10; unu paĝo, \$20. El landoj, el kiuj oni ne povas sendi monon, oni sendu la valoron per neuzitaj poŝtmarkoj, aŭ similaj valorajoj, al: Conrad Fisher, Route 1, Meadville, Pennsylvania, Usono.

The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 5

Sept.-Oct., 1957

No. 5



Left to right: Charles Powell; Paul Reynolds, TV program director; George E. Wagner.

SO YOU THINK LEARNING THE INTERNATIONAL LANGUAGE WOULD BE DIFFICULT!
Or — being an Esperantist, you think that getting publicity for Esperanto is too tough to be worth trying!

Charles Powell (13 years old) of Tampa, Florida, doesn't share your illusions. He is still naïve enough to think that all it required was a little work. So he got busy.

Last January he started to learn Esperanto. In August his instructor, Mr. Wagner, reported: "Charles is now able to hold conversations in Esperanto, is reading his second book, and ably assists in teaching others." He also arranged for an Esperanto exhibit in the public library, and a television appearance for himself and Mr. Wagner.

Go thou and do likewise

Rememoroj pri Thomas A. Edison

de Howard G. Borden

MIA UNUA RENKONTO KUN Thomas A. Edison estis dum Januaro, 1921. Mi estis laboranta en latuna fandejo esperante fariĝi produkta administranto, kiam la fabrikejo ĉesis pro manko de sufiĉa aktiva kapitalo. Mi vizitadis la laborperejojn en Novjorko kaj iun tagon mi ricevis oportunon turni min al la fabrikejo de Thomas A. Edison.

Mi prezentis min al la personara administranto kaj sendiĝis tuj al S-ro Meadowcroft, la sekretario de S-ro Edison.

S-ro Meadowcroft konatigis min kun S-ro Edison, kiu invitis min altabligi kaj donis al mi unu el siaj plej fruaj demandoj. Estis aro de demandoj por provi ĝeneralan scion, neniel sciencaj. Mi ne memoras multajn el la demandoj kvankam poste ili publikiĝis en la "Literary Digest" kun laŭdiraj ĝustaj respondoj. Unu demando kiun la "Digest" respondis malprave estas, "Kio estas la pezo de aero en ĉambro 20 futojn x 10 futoj x 10 futoj?" La "Digest" donis kiel respondon 14,700 funtoj, la premo de la aero kontraŭ la tutaj internaj muroj. La ĝusta respondo estas proksimume 162 funtoj. Ĉar mi estas avida leganto mi havis malgrandan malfacilecon pro la demandoj kaj mi finiĝis post mallonga tempo.

S-ro Edison prenis la paperon kaj li mem trarigardis ĝin. Estis silente ĝis subite li saltleviĝis kaj ekkriis, "Meadowcroft, Meadowcroft. Ĉi tie estas viro kiu scias el kio latuno fariĝas." Li turnis sin al mi, "Vi scias, S-ro Borden, latuno estas ĉirkaŭ ni ĉie, kaj neniu scias el kiu ĝi fabrikiĝas."

Mi opinias ke li neniam sciigis ke mi lastatempe laboris en latuna fandejo.

Post nelonge estis dudek de la "demandaroj" knaboj. Oni donis al ni la malenvidandan taskon trairi la fabrikejon por fari sugestojn kaj kritikojn. Niaj raportoj

estis donataj senpere al S-ro Edison skribe ĉiun posttagmezon kaj ĉiun matenon ni ricevadis liajn komentojn skribe. Iujn el liaj komentoj mi estus devinta teni en miaj memoraĵoj sed ne faris tion.


La preskaŭ neevitebla rezulto de niaj kritikoj, kun la apogo de T.A.E. estis, ke la kontrolistoj transiĝis kaj ke ni instaligis en iliaj postenoj. Ankoraŭ raportoj ĉiutage. Paul Field kaj mi fariĝis estroj de la fako kiu fabrikas sensulkajn diskojn por fonografoj.

La diskoj fariĝis el muelita ligno, fulgo kaj kolofono — tre malpuriga tasko. La kolofono solviĝis en alkoholo, kaj la solvaĵo miksiĝis kun la ligno kaj fulgo, la tutaĵo tiam sekigis en fornoj kaj la alkoholo estis rericivita. Ofta malfacilaĵo estis ke vezikoj aperis sur la diskoj en la fina stadio kaj la kialo ne povis esti eltrovita. Iun nokton S-ro Edison decidis fari serion de eksperimentoj. Li envenis en la fabrikejon proksimume noktmeze kaj skizis la ordonojn por la eksperimentoj. Li vidis ke ni rekte komencis kaj tiam sternis sin sur tablon kun staplo da diskoj kiel kuseno. Mi fotografis lin per dek-minuta esposo. Bedaŭrinde mi perdis ĉi tiun malbonan sed valoran fotografiaĵon.

Unu el la knaboj sendiĝis al lia domo por alporti la noktmezan manĝon de S-ro Edison. S-ino Edison demandis al li ĉu necesas ke S-ro Edison laboru tiel malfrue. Li diris al ŝi "Ne." Dum longa tempo li havis tre malfeliĉan vivon.

Esperanto Vagabonds in Europe

(Comment by the Doneis family on their travels in Europe. See also page 14.)

 THE ARMS RACE SEEMED TO BE UPPERMOST in the minds of most Europeans. In our meetings with various groups and societies and in individual conversations too, much concern was expressed over America's apparent insistence on continuing the arms race, and on the urgency with which our military leaders are pressing arms into the hands of other peoples. Almost everywhere the feeling predominated that

America is placing her trust in armed might more and more and has too seldom cooperated with the United Nations and efforts at reconciliation and arbitration. The fear was so often expressed that America seems to fear for her privileged position in the family of nations and that the entire world stands in danger that some trigger-happy American soldiers craving action in a trouble-spot might touch off the next conflagration. They deplore the billions lavished on arms.

In Germany the overwhelming resistance to remilitarization prevails in spite of America's attempts to beguile the Germans with the doubtful privilege of participating in N.A.T.O. Chancellor Adenauer is experiencing embarrassing difficulty in recruiting young men. Only the professional soliders of Hitler's day are responding. The populace is not just indifferent to remobilization, but is outspokenly hostile to rearmament. They have lost faith in the efficacy of armed might to settle international tensions justly.

In Denmark and Netherlands we found some latent feelings smouldering against the Germans as a result of the occupation and consequent destruction. This probably would have escaped us or been less evident except for the fact that we were driving a Volkswagen with a German license, and we were mistaken for Germans several times. One day Mary was sitting in the parked car in Copenhagen when a Dane approached her, and seeing the German

license with the big "D" for Deutschland, he roundly cussed her. Fortunately, she didn't understand a word he said, but the spirit of his remarks was unmistakable.

On an earlier occasion Armin drove the car from Hamburg to Rotterdam, arriving after dark. Being strange in the city and having lost his directions in the dark, he missed his way and finally ran out of gas in the middle of the vehicular tunnel under the Maas (Rhine) River. Nobody stopped to give him a push or loan him gasoline because the large "D" identified the car as unmistakably German to all the Dutch drivers that passed him by. Finally a police truck arrived to tow him out to where he could buy gas, and charged him the Dutch equivalent of ten dollars, fine and towing charge.

In the process Armin tried to speak to the officer in Esperanto and English, neither of which the cop seemed to understand. Then Armin resorted to German because of its similarity to the Dutch language. (But don't try to get a Dutchman to admit it!) When Armin fumbled and stumbled for lack of the right German word, the cop looked up and asked in Dutch, "Are you British?" to which he got the reply, "No, I'm American." At this the policeman's face lit up and he became downright affable and he became almost apologetic for having taken the ten dollars (But he didn't break down and give it back!) From then on we didn't use the German language in the Netherlands.

Local Addresses

Centro por Kanadaj Esperantistoj: Box 52, Terminal A, Toronto, Kanado.

Esperanto-Klubo de Los Angeles: 1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29, Calif.

Washington Esperanto Club: Apt. 101, 2829 Gainesville St., S.E., Wash. 20, D.C.

Esperanto-Societo de San Diego: P.O. Box 4367, San Diego 4, California.

Seattle Esperanto Society: 3231 West 62nd St., Seattle 7, Wash.

Esperanto in Buffalo: P.O. Box 222, Niagara Sta., Buffalo 1, N.Y.

Esperanto Coterie of Texas: P.O. Box 805, Houston 1, Texas.

Esperanto Club of Santa Monica: 855 Franklin St., Santa Monica, Calif.

Esperanto Society of Greater New York: 767 United Nations Plaza, New York 1, NY

Esperanto Society of San Francisco: 346 Staples Ave., San Francisco 12, Calif.

Sacramento Esperanto Club, 450 45th St., Sacramento 19, California.

Esperanto Society of Long Beach: R. C. Betteridge, Pres., 5409 Graywood Ave.,
Lakewood, Cal.

Skolta Esperantista Ligo, Massachusetts Grupo, Thomas Duncan, Grupestro,
73 Winchester St., Brookline 46, Mass.

George E. Wagner, 403 E. North St., Tampa 4, Florida.

H. K. Ver Ploeg. 1908 East 8th Avenue, Spokane 32, Wash.

Jarvis E. Bush, 3700 North 75th St., Milwaukee 16, Wisconsin.

Christie W. Roberts, Rose Valley, Saskatchewan, Kanado.

F-ino Ethel Kelley, Birch-haven, RFD 1, Cambridge Springs, Penna.

Mr. and Mrs. Wesley Stevens, 211 North Dithridge Ave., Pittsburgh 13, Penna.

(a blind couple, correspond by tape recordings. Want local contacts for study group.)

Bonvolu Skribi

S-ro Albertino Alves de Almeida, E.P.C. Do Ar, Barbacena, Minas Gerais, Brazilo.

S-ro José Cobra, Rua Minas Gerais No. 85, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

S-ro Ary Lopes, Rua Caminho Novo No. 18, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

Fraŭlo Nelson Noronha Neto, E.P.C. Do Ar, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

Fraŭlo Joao Batista Jorge Pinto, Avenida Rodrigo Silva, 207, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

Fraŭlo Geraldo Simoes De Castro, Rua 15 de Novembro, No. 240, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

F-ino Maria Alves Cobra, Rua Minas Gerais No. 85, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

S-ro José Rodrigues De Almeida, Rua Tomaz Gonzaga, No. 340, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

S-ro José Salvador Nadalin, Rua Tomaz Gonzaga, No. 285, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

S-ro Lincon Antunes, Rua Martinho Campos No. 60, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

Fraŭlo Altair Prenassi, Rua Campolide, 161, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

Fraŭlo Waldemar F. Meneghin, Avenida Rodrigo Silva, 100, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.



(Antaŭa artikolo pritraktis la fondiĝon de la Esperanto-movado en Meksikio ĝis ĉirkaŭ la jaro 1905. Jen pri posta evoluado.)

S-anoj Ramon Manterola kaj D-ro Ambrosio Vargas Valencia en tiu epoko intervjuis sinjoron Prezidinton Porfirio Diaz kaj la tiaman Edukministron S-ron Justo Sierra por trakti kun ili pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La diktatoreca epoko ne permesis tion, do la Edukministro rifuzis la proponon. Laŭ rakonto de D-ro Vargas, S-ro Justo Sierra estis malamiko al Esperanto. Malgraŭ tio, ili daŭrigis la laboron.

Inter aliaj laboroj de samideano Manterola estis la enkonduko de Esperanto en la Leĝosciencan Lernejon de la ŝtato Miĉoakan, krom alia grupo ekzistinta tie.

La du menciitaj samideanoj, kiuj akorde laboradis, rimarkis ke la unua komitato ne funkcias, tial per la gazetaro ili vokis al la esperantistaro por fondo de "Centra Meksika Esperantista Societo" en Januaro, 1906. En la nova grupo aperis kuraĝaj samideanoj: Profesoro Ludoviko G. León; Kolonelo Ludoviko G. Palacios, kiu enkondukis Esperanton en la armeon kaj diversajn societojn; S-ro Kornelio Zamudio, kiu inaŭguris kurson en la Aneksa Lernejo por Profesoroj; Pastro Manuel Diaz Rayón, kiu malfermis kurson por junuloj; Kolonelo Jozefo Manterola; S-ro Arkitekto Ruíz kaj aliaj entuziasmaj anoj de la nova grupo, kies komitato estis jena:

Prezidanto, Lic. Ramón Manterola; Vicprezidanto, Ludoviko G. León; Sekretario, D-ro Ambrosio Vargas Valencia; Subsekretario, Arkitekto Ludoviko G. Ruíz; Kasisto, Kolonelo Ludoviko G. Palacios.

Ili ĉiuj loĝis en la ĉefurbo, tial ilia laboro por la movado estis plej efika, tiel novaj kursoj estis malfermitaj en la Altlernejo por Profesoroj kaj en la lernejo por blinduloj. Tiu ĉi komitato bonege laboradis per novaj kursoj, prelegoj en diversaj societoj kaj lernejoj. Tiel finiĝis la unujara periodo.

La jaro 1907 estis bonega kaj fruktedona por nia movado, do la lernolibroj multobliĝis. En la jaro 1904 samideano Morin eldonis tre utilan lernolibron. En majo, 1907, kunlaboris Profesoro Ludoviko G. León, eminenta pedagogo, pro kies ampleksa laboro en la edukkampoj la registaro dediĉis je lia memoro en la ĉefurbo lernejon, kiu havas lian nomon. La verkaro de tiu Profesoro estas ampleksa. Li verkis pli ol 80 diversajn verkojn— pri astronomio, geografio, kemio, botaniko, mineralogio, zoologio, fiziko, moralo, ktp.

Per sama volo li laboradis por Esperanto. Li verkis pli ol 15 diversajn lernolibrojn esperantajn. Li komencis fari tian laboron en majo, 1907, kaj samtempe eldonis *Meksikian Revuon*. Tiel li preparis la terenon kaj en julio de la sama jaro li fondis la Akademion Zamenhof, tial oni nomis lin ĉampiono esperantista. La Komitato de la Akademio estis:

Honora Prezidanto, D-ro L. L. Zamenhof; Prezidantino, F-ino Ma. de la Luz Magaña; 1a Vicprezidantino, F-ino Laura Martínez; 2a Vicprezidantino, F-ino Luz Vallejo y Gaitan; Sekretariino, F-ino Guadalupe Aguilar; Subsekretariino, F-ino Manuela Aguilar; Kasistino, F-ino Isabel González García.

José Serrano

KOMUNIKAĴO de UEA

Estimataj Samideanoj,
LA KOMITATO DE U. E. A. en sia kunsido de la 9-a de aŭgusto 1957 en Marseille akceptis unuanime la sekvantan rezolucion por diskonigo al vi ĉiuj:

“SITUACIO EN USONO

“La Komitato de U. E. A. ekzamenis la situacion en Usono kaj kun plezuro konstatis, ke la tiea neŭtrala landa asocio, Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA), konsiderinde fortikiĝis kaj ke la membraro de U. E. A. en Usono tre kreskis, tiel ke Usono nun okupas la unuan lokon en la Internacia Konkurso de U. E. A. Samtempe la Komitato konstatis, ke G. A. Connor kaj grupeto da personoj ĉirkaŭ la t.n. “Amerika Esperantisto” daŭrigas sian kampanjon de kalumnioj kontraŭ U. E. A. kaj ĝiaj funkciuloj.

“La Komitato atentigas la tutan esperantistaron, ke ĝi eksigis G. A. Connor el U. E. A. pro lia peze kalumnia agado kontraŭ la Asocio kaj kontraŭ la Esperanto-Movado ĝenerale, kiel ankaŭ pro liaj falsaj denuncoj (vidu la protokolon de la kunsido en Kopenhago, Jarlibro 1956 Dua Parto, paĝo 91.)

“La Komitato do alvokas ĉiujn Esperanto-Organizaĵojn, Ĉefdelegitojn, Perantojn, Delegitojn, Redakciojn de Esperantaj gazetoj, la Esperanto-Eldonejojn kaj Libroservojn, kiel ankaŭ la unuopajn esperantistojn, interrompi kun tiu persono kaj kun ‘Amerika Esperantisto’ ĉiujn rilatojn, eĉ pure komercajn. La solaj reprezentantoj de la neŭtrala Esperanto-Movado en Usono estas la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (ELNA), R.F.D. 1, Meadville, Pennsylvania, kaj la Ĉefdelegito por Usono, S-ro D. E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37, California.”

Ni aparte atentigas niajn ĉefdelegitojn, ke ili ne povos peri abonojn al “Amerika Esperantisto”, kiel tio estas sugestita en varbaj cirkuleroj akompanantaj tiun gazeton. — *M. H. Vermaas,*
Direktorino C. O.

DONACOJ al la REVUO



Tutkoran dankon al: H. K. Ver Ploeg, \$5.10; Familio Jungton, \$10.00; Lew Gobble, \$10.00; F. J. Du Bois, \$10.00.

Responde al S-ano A.D. Cook (vidu p.11)
Per bonŝanca ĥemia eksperimento vizitilo riĉiĝis kaj hodiaŭ gaje faras bonaĵojn.

Ĉiujare usonanoj legas proksimume 18,500,000,000 ĵurnalojn, 4,500,000,000 gazetojn (inter tiuj ne sufiĉajn *Revuojn*) kaj 450,000,000 librojn, kaj faras al kineoj 5,000,000,000 vizitojn.

KIU PRAVAS?

Ĉe kunsido de la Amerika Raketa Societo, raketa sciencisto Robert Lusser diris ke kredeble homoj neniam vojaĝos al la luno, ĉar “ni estas alproksimiĝantaj al la limoj de homaj klopodoj.”

En parolado al kunsido de la Amerika Ĥemia Societo, D-ro Norris W. Rakestraw diris ke la homa scivolemo, per scienco, kredeble lernos ĉiujn sekretojn de la naturo, eĉ pri la originoj de la vivo kaj de la universo.



She learned Esperanto so she can talk to them when she gets there.

Trans la Lingvajn Barilojn

Francis kaj Bonnie Helmuth, el San Diego, komencis lerni Esperanton en Aprilo, 1955. Post jaro kaj duono ili entreprenis unujaran vojaĝon tra Eŭropo, kaj raportas al ni.

PARIZO, FRANCUJO, LA 19AN DE NOVEMBRO, 1956—Ekzistas en la Jarlibro de la Universala Esperanto-Asocio reklamo por la Hotelo Felix, Rue Moliere 26, Parizo, Francujo. Kiam Bonnie kaj mi vidis ĉi tiun reklamon ni decidis viziti la Hotelon Felix dum nia vizitado en Parizo.

Ni foriris el Wiesbadeno, Germanujo, ĵaŭdan vesperon, la 15an de Novembro, je la oka kaj duono, kaj ni alvenis en Parizon je la sepa, vendredan matenon. Ni tuj iris al la Hotelo Felix, per taksio, ĉar la reklamo en la jarlibro ankaŭ enhavas la vortojn “Esperanto parolata.” Estis nur mezaĝa virino en la hotelo, kiu ne povas paroli aŭ Esperante aŭ angle, kvankam ŝi montris al ni per signa lingvo, ke la Esperantisto alvenos je la dekdua, tagmeze. Ni lasis niajn valizojn ĉe la hotelo kaj promenis tra kelkaj stratoj en la bela, fama kaj interesa urbo, Parizo.

Post trihora promonado ni revenis al la Hotelo Felix kaj tiam estis en la oficejo de la hotelo viro kiu salutis nin per la vortoj “Bonan tagon.” Estis S-ro Jean Thierry, juna viro kiu estas duonposedanto de la malgranda hotelo. Li ankaŭ estas vic-delegito por UEA kaj prezidanto de la Pariza Esperanto-Asocio. S-ro Thierry montris al ni ĉambron kaj ĝi tre plaĉis al ni, do ni decidis resti ĉe la Hotelo Felix dum nia restado de tri tagoj en Parizo. Antaŭ lia foriro, S-ro Thierry invitis nin al la semajna kunveno de lia grupo la saman vesperon, je la naŭa.

Post kvarhora dormeto ni vestiĝis, iris al restoracio por vespermanĝi, kaj tiam revenis al la hotelo por renkontiĝi kun S-ro Thierry je la oka. Kune ni veturis, per

aŭtobuso, al la kunveno de la Pariza Esperanto-Asocio. Oni kunvenas ĉiutage, en la fama Universitato Sorbonne, en la geografia prelega ĉambro. Ĉeestis la kunvenon ĉirkaŭ tridek geesperantistoj kaj ni aŭskultis interesan paroladon pri de Beaufronte, la fama kaj unua franca Esperantisto kiu post kelkaj jaroj da bona laboro por nia afero perfidis la Esperantan movadon per la prezento de sia lingvo Ido. Ni lernis multe pri ĉi tiu okazo kaj pri la perfidulo, de Beaufronte.

Estis iomete da tempo post la parolado, do mi havis la tempon por paroli nur kelkajn vortojn al la grupo pri Usono, Kalifornio, kaj ankaŭ pri la movado en San Diego kaj Los Angeles. Ni renkontiĝis en kafejon post la kunveno, kaj tie ni renkontis S-ron Schwartz, malnovan Esperantiston kiu diris ke li volos renkonti nin ĉe la kongreso en Marsiello dum Aŭgusto, 1957, kaj ni renkontis S-ron Gaston Fournier, vic-delegito de UEA, kaj ankaŭ aliajn gesamideanojn. Ni ĝuis interparolon dum du horoj kun la geesperantistoj kiuj loĝas en Parizo, kaj bedaŭrinde ni ne havis alian okazon por interkoniĝi kun ili ĉar nia restado en Parizo estis tro mallonga.

London posttagmeze ni havis iomete da tempo do ni iris al la biblioteko de la ĉambro de komerco ĉar ni legis en la jarlibro de UEA pri “Grava Esperantofako” tie. Ni trovis en la biblioteko multajn librojn kaj gazetojn, pli ol du mil, pri Esperanto kaj diversaj grupoj tra la mondo ĝis la komenco de Esperanto. Ni rigardadis la librojn dum du horoj kaj tiam ni devis iri al la stacidomo por iri per vagonaro al Barcelono, Hispanujo.

ESPERANTO EN NORDA AMERIKO

NEW YORK, N.Y., SAN FRANCISCO, CAL. kaj interlokoj: Philadelphia, Somerton, Valley Forge, Morrisville, Washington, Buffalo, Fort Erie, Toronto, Oakville, Cleveland, Toledo, Chicago, St. Louis, Kansas City, Denver, San Diego, Los Angeles, Santa Monica — Kredeble la plej aktivaj roluloj en la nordamerika esperanta movado ĉisomere estis nenordamerikanoj. S-ano Bertram Potts, redaktoro de *New Zealand Esperantist*, kaj S-ino Potts, hejmenirante post unujara prelegvojaĝo en Eŭropo sub aŭspicio de UEA, sciigis S-anon Fisher pri la vojaĝplano. Li tuj aranĝis akceptojn por ili en la supre nomitaj lokoj. Ĉie ili trovis “ruĝan tapiŝon” sternitan por ili de la lokaj aktivuloj.

Dum la vojaĝo ili faris prelegojn diversloke, estis intervjuitaj kelkfoje de ĵurnalistoj, aperis ĉe televido kaj radio.

Eble neniam antaŭe eblis tiel bone organizita kunlaborado inter niaj aktivuloj.

GREENSBORO, N.C. — La *Greensboro Record* prezentis bildon de funkcianta Esp-klaso instruata de S-ano David Neave, kun artikolo pri Esperanto kaj la klaso.

S-ano Neave estis en la usona aerarmeo dum la milito, kaj tiam decidis ke post la milito li laboros por mondpaco. Post longa pripensado, li decidis ke la plej bona ilo estas internacia lingvo por eviti miskomprenadon inter popoloj.

Antaŭ du jaroj, li aĉetis lernlibron kaj komencis lerni la internacian lingvon. Ses semajnojn poste, li estis uzanta la lingvon por eksterlanda korespondado. En aprilo ĉijare li starigis klason, kiu tiel sukcesis ke li anoncis ke nova kurso komenciĝos en oktobro.

PHILADELPHIA, PA. — Ĉe stacio WPEN, Frank Ford interjvis S-anon Edw. Pharo pri Esperanto kaj la Ligo.

SPRINGVILLE, UTAH — D-ro M. L. Glendenning, malnova samideano el Los Angeles, havas klasojn en 4 urboj. Ĉu oni etendos la urblimon de L. A., tiel ke la genovuloj en Utah estos anoj de la patra klubo?

SPOKANE, WASH. — S-ano H.K. Ver Ploeg anoncis starigon de nova kurso en septembro, kaj ekspozicios esperantaĵojn en la publika biblioteko en novembro.


WASHINGTON, D. C. — S-ano Wm. E. Baff prezentis ekspozicion en la biblioteko kaj poste ĉe Bureau of American Republics.

Voice of America intervjuis lin pri la ekspozicio kaj pri la esperanta movado, por programo dissendota al Eŭropo kaj al Azio.

PHOENIX, ARIZ. — S-ro Eugene Clayton legis en *Encyclopedia Britannica* artikolon pri Esperanto, kiu diris ke la ĉefsidejo de la usona E-movado estas en Washington, D.C. Li do telefonis al Washington, petis helpon de la informa servo de la telefonkompanio. Oni trovis ke S-ano Baff ĵus aranĝis listigon de “Esperanto Service” en *presota* telefonlibra. Tiel, per transkontinenta telefonvoko li kontaktiĝis kun S-ano Baff, ricevis informojn pri lernolibroj, pri nia Ligo, ktp., kaj (ni esperas) nun bone lernas la lingvon.

TAMPA, FLA. — S-ro Charles Powell komencis lerni Esperanton en januaro ĉijare. En aŭgusto li flue parolis la lingvon, avide legis esperantajn librojn, kaj helpis en la instruado al aliaj. Li ankaŭ aranĝis ke la biblioteko prezentu ekspozicion de esperantaĵoj, kaj ke li kaj lia instruinto, S-ano George Wagner, aperu ĉe televida programo. (Vidu bildon ĉe paĝo 1.)

S-ro Powell estas 13-jaraĝa.



Nia Literaturo

*Literatura Redaktoro: D. B. Richardson,
3412 North Mullen, Tacoma 7, Washington*

(La libroj recenzitaj en ĉi tiu rubriko estas mendeblaj ĉe: Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.)

EN LA LASTA TEMPO aperis pluraj novaj libroj, el kiuj kelkaj estas tre gravaj aldonoj al nia literaturo. Apenaŭ klasi-fikebla kiel beletristiko, sed certe bonstila kaj distra libro estas *Dekkinga Fuĝas*, nederlanda romano eldonita de Dansk Esperanto-Forlag. Ĝi estas t. n. "mister-rakonto" kun intrigo kiun oni povas travidi jam post la unuaj kelkaj ĉapitroj, kaj abundas je malverŝajnaj koincidoj kaj nekredeblaj intrigoturnoj. Sed ĝi estas tia libro, kiun oni ĝuas legi, pro du kialoj. La lingvo estas bonega kaj ĝi sukcesas precipe en la ĉiutagaĵoj, kiuj en tro multaj esperantaj tradukoj elvenas malgraciaj kaj malvivaj. Kaj la libro donas informojn pri la milittempa vivado en Nederlando, ĉar la rakonto disvolviĝas ĝuste dum la tempo de la germana okupado. Kun 220 paĝoj, bonaj papero kaj preso kaj ilustrita (kartona) kovrilo, ĝi nepre estas rekomendata por via "malpeza" legado.

Kontraste kun ĉi tiu, *Homoj kaj Riveroj*, de Johan Hammond Rosbach, estas klasike beletra aro de noveletoj en tre pura

stilo. La rakontoj, krom unu-du esceptoj, estas pli biografiaj . . . eĉ anekdotaj . . . ol fikciaj. Rosbach estas klare homo kun eksterordinara percepto; liaj skizoj el sia infana tempo, plenaj je sentemo, donas vidon pri la vivo en Norvegujo antaŭ nur kelkaj jardekoj, kaj certe vekas en la leganto nostalgion pri similaj travivaĵoj en ties propra junaĝo.

La lingvo estas ĝenerale tre bona, sed mi miris pri la nekutima uzo . . . dufoje . . . de la vorto "pentri" por "kolorigi," kio ja estas tute alia afero. La uzo de "memortigo" anstataŭ "memmortigo" estas verŝajne preseraro. Cetere, mi trovis nenion kritikindan. Entute ĝi estas tre ŝatebla libro kaj inda aldono al la serio de KOKO-libroj (Eldonejo de la Komuna Konversacia Klubo en Kopenhago.)

Tre interesa nova libro estas *Japanaj Fabeloj*, eldonita de la t. n. "Amo-Akademio" en Aiĉiken, Japanujo. Ĝi estas kolekto de kvin popol-fabeloj, transdonitaj de generacio al generacio, kaj rakontitaj al la infanoj kvazaŭ "lulrakontoj"(!) Mi certe hezitus rakonti tiajn al *mia* infano, ĉar ili temas pri ĉiaspecaj kruelaĵoj, murdoj, kanibalaĵoj ktp. La personaro konsistas parte el bestoj kaj malvivaj estaĵoj, kiel en okcidentlandaj fabeloj, kaj . . . ankaŭ simile al ĉi tiuj . . . emas instrui moralajon; sed ĉiam la moralajo estas nur *venĝo*: iu aŭ io faras ion malbonan en la komenco, kaj en la fino li aŭ ĝi ricevas eĉ pli malbonan repagon. Sed mi trovis la libron intense interesa ĝuste pro tio, ke ĝi pensigas pri la pratempa japana vivo kio povis naski tiajn rakontojn, kaj pri la infanoj, kiuj unue lernis pri la vivo de ili. Pro tio, kaj pro la kvin belaj kolorbildoj kaj la tre malalta prezo (40 cendoj plus sendkostoj) mi povas rekomendi la libron . . . al plenkreskuloj!

Aventuroj por kaj per Esperanto



BLE NENIAM MI TROVIĜIS DUM MIA TUTA VIVO en pli malfacila kaj ĥaosa situacio ol kiam mi devis pasigi kontraŭvole du monatojn en la Rumania havenurbo Konstanco. Senlabore, kun pasporto malvalida de “malamika” lando mi atendis ĉiuminute areston k sekve multmonatan karceran laboron en tiu sendube la plej korupta lando en la mondo. Efektive mi sentis kiel muso en kaptilo, kiun fromaĝo logis al fatalo neevitebla. Por pligrandigi mian malfeliĉon sampatriano mia trompis min lasante al mi nur 12-cendan “kapitalon”. Nur unu sola solvo restis al mi por eskapi el fatala “muskaptilo”: aliĝi al la Franca Fremda Legio. La Konstanca franca konsulo rajtis varbi NE Rumaniajn civitanojn al la Fremda Legio. La konsulo akceptis min, sed instrukiis al mi, ke mi devos reveni post 3 semajnoj, kiam la franca ŝipo “Patrie” prenos min kun ĉ. sesdek aliaj varbitoj.

Atendi 3 semajnojn kun 12 cendoj en la poŝo antaŭsentigis al mi tre timigan perspektivon. Forlasinte la konsulejon mi direktis min al la apudurba marstrando; almenaŭ la plezuron de banado en la Nigra Maro mi povis senpage ĝui. Kun pezega kapo, turmentate de la fatala sorto, mi proksimiĝis al la strando, kiam subite klara voko, “Saluton al vi, Samideano” vekis min el mia enpenŝiĝo. Antaŭ ol ni prezentis nin unu al la alia, ni ambaŭ reciproke eraris, ke la “alia” estas Konstanca loĝanto, kaj ni tre ĝojis renkonti “Konstancan” samideanon. Sed mi eksciis tuj, ke ankaŭ li estas fremdulo el Slovakio, pasigante kelksemajnan ferion someran apud Konstanco. Li rekonis

min per mia verdstela insigno kaj vere tiam la verda stelo savis min el fatala fino en la Fremda Legio. Post interkonigo nia li prezentis min al aliaj slovakianoj, kiuj kun li somerumis tie. Tiam mi estis tute nova, nur kelkmonata esp-isto, sed nia interkomprenigo funkciis perfekte. Kvankam la renkontigo kun tiu slovakia samideano iom malpliigis mian spiritan tension, mi ne povis kaŝi mian turmentigon pro mia “nigra” perspektivo. Li divenis mian situacion kaj tuj oferis - kiel distinge altranga komisiito de la slovakia ŝtata fervojaro - asisti al mi eskapi el tiu Konstanca “muskaptilo”. Mi ĉiam memoros lian rimarkon: “Se vi estus sampatriano mia, sed NEesp-isto, mi ne multe klopodus helpi. Kvankam vi estas civitano de lando “malamika” al Slovakio, sed esp-isto, mi tre volonte helpos al vi laŭ mia kapablo.” Por konkludi la rakonton mi diras nenion pri la detaloj de mia sukcesa eskapo el Konstanco, nur tion ke dank’ al lia asistado kaj influo mi senriske povis foriri de tie kaj ne plu necesis eĉ pensi pri la Fremda Legio.

Ralph R. Bonesper

Bonvolu Skribi

Fraŭlo Antonio F. De Oliveira, Av. Rodrigo Silva, No. 108, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

Fraŭlo Macário Da Silveira, Destacamento de Base Aérea de Santos, Est. de Minas Gerais, Brazilo.

F-ino Sonia Alves Cobra, Rua Minas Gerais No. 85, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

F-ino Zoé Macedo Ramos, Caixa Postal No. 216, Barbacena, M. Gerais, Brazilo.

ADRESOJ de POSTENULOJ de ELNA

Prezidanto: Armin F. Doneis, Sr.
Box 105, Pharr, Texas.
Vieprezidanto: Dirk Brink,
P.O. Box 4367, San Diego 4, California.
Sekretario: Conrad Fisher,
RFD 1, Meadville, Pennsylvania.
Kasisto: Edw. W. Pharo, Jr.,
220 County Line Rd., Somerton 16, Pa.

ESTRARANOJ

David B. Richardson,
3412 North Mullen, Tacoma 7, Wash.
Miss Roan U. Orloff,
31 Nahanton St., Newton Centre 59, Mass.
Elwyn C. Pollock,
2222 Crest Drive, El Cajon, Calif.
Thomas A. Goldman,
719 Chapala Dr., Pacific Palisades, Calif.
Forrest J. Ackerman
915 S. Sherbourne Dr., Los Angeles, Calif.
Howard G. Borden,
917 Edgewood Ave., Trenton 8, N. J.
Adrian Hughes,
476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon.
Francis E. Helmuth,
803 Gage Dr., San Diego 6, Calif.

SILABENIGMO

A, AR, AR, BO, DAL, DEL, DI, EB, FO,
IO, IO, JA, LA, LI, LI, LO, NA, NO,
O, O, O, OK, ON, UL.

El la supraj 25 silaboj formu 10 vortojn
kiuj havu la jenajn signifojn:

1. poseda pronomo.
2. granda vegetaĵo.
3. floranta bulba vegetaĵo.
4. ritma melodio.
5. nenormala malgrandulo.
6. saltanta besto.
7. organo de vidkapablo.
8. ornama floranta vegetaĵo.
9. nigra malmola ligno.
10. fidela.

Legate de supro malsupren, la unuaj kaj triaj literoj de la trovendaj vortoj indikas la titolon de konata Esperanta traduko de libro de angla aŭtoro H. G. Wells.

(*Se vi estas kritikema, legu "litergrupo" anstataŭ "silabo". Red.*)

Bonvolu Skribi

DEZIRAS KONTAKTI FILATELISTOJN en Usono kaj Kanado. Bonvolu skribi al: Karel Kapler, Brno 18, Cornovova 45, Ĉeĥoslovakio.

ATENTU, POLOJ! Mi volas interŝanĝi grandformatan 200-paĝan fotoalbumon "Urbo Nesubigita" pri la Varsovia ribelo en 1944, je angle-polaj kaj pole-anglaj ampleksaj vortaroj. Aliaj proponoj akceptataj, Red. Jerzy Uspienski, Warszawa 10, ul. Mokotowska 3m.39, Pollando.

Franco Denkowski, Szopienice 4, str. Zielona 3, k. Katowic, Pollando. Dez. kor. kun ministoj aŭ karbminejaj laborantoj en ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj, interŝ. ilustraĵojn

Alfabela Frazo:

Tiu ĉi frazo enhavas ĉiun literon de la Esperanta alfabeto minimume unufoje. Kiu povas elpensi pli bonan aŭ pli mal-longan?

Bona ĥina ĝardenisto ŝatas kulturi pizojn aŭ ĉian vegetaĵon krom florantaj hiacintoj.

A. D. Cook

ANONCOJ

Tarifo: \$1 ĝis sep linioj. Dek procenta rabato por du- aŭ plifojna apero. Petu informon pri tarifo por pli grandaj aŭ multfoje aperantaj anoncoj aŭ reklamoj.

Introduction to
ESPERANTO
THE UNIVERSAL LANGUAGE
The Third Edition . . . REVISED . . . Price \$2.00
Sent on Five Days FREE Examination!
BOX 792 • PLACERVILLE, CALIF.

Learn

ESPERANTO

by Correspondence

ESPERANTO-by-MAIL

123 East 35 Street Brooklyn 3, N. Y.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

Pri "Televizio" kaj Internaciaj Vortoj

de Thomas A. Goldman

LA KOMENTO DE S-RO BUTLER pri televizio-televideo-televido, en antaŭa numero de *Nordamerika Esperanto-Revuo*, indikas ke al la naturisma skolo de Prof-o Azorin ne mankas disĉiploj. Kvankam S-ano Butler asertas ke liaj asertoj estas "ekster dubeto", mi kuraĝas sufiĉe por gardi la opinion ke ili estas nepre eraraj, pro la jenaj kialoj: Por ke la vorto "televido" estu "nature formita", kiel diris S-ano Butler, ni bezonus radikon "tele-" en Esperanto. Ĝi tamen ne troviĝas inter la oficialaj radikoj, kaj se ni dezirus enkonduki ĝin, ni devus tion fari komplete, ne nur parte. Se "televido" estus la ĝusta formo kaj "televizio" malĝusta, ni devus konkludi ke "teleparoli" kaj "teleskribi" estas ĝustaj, kaj "telefoni" kaj "telegrafi" malĝustaj! Per tiaj malsaĝaĵoj ni facile povus ridindigi nian lingvon, precipe en la okuloj de la sciencistoj, kies apogo estas tiel grava por la plua sukceso de Esperanto.

Efektive, la internacia formo "televizio" estas nepre postulata de la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko, kiu diras:

"La tiel nomataj vortoj *fremdaj*, t. e. tiuj, kiujn la plimulto el la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi sensanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto."

Ke la plimulto el la lingvoj prenis la vorton el la sama fonto indikas la jena listo: *angle*, television; *france*, television; *hispane*, televisión; *itale*, televisione; *germane*, Television (ankaŭ 'Fernseher') *svede*, television; *nederlande*, televisie; *ruse*, televiziya; *portugale*, televisiao.

Interese estas ke en la rusa troviĝas tri apartaj formoj: unue, la adjektiva formo "televizionnaya" (la finaĵo varias laŭ la sintakso), kaj du nomoj, "televiziya" kaj "televideniye". La lasta ŝajnas iom pli nacieca, aŭ "naturisma", dum la adjektiva formo korespondas entute al la internacia formo. La germana formo "Fernseher", laŭ modelo de la konata "Fernsprecher" por "Telefon", estas amataĵo de la germanaj naciistoj, kiuj deziras "konservi la

lingvan purecon de la germana raso", kaj, laŭ mia scio, ne trovis larĝan akcepton. Por la cetero, oni devas diri ke malmultaj vortoj estas tiel plene internaciaj kiel ĉi tiu. Ofte okazas ke vorto internacia tamen ŝanĝiĝas, pasante de unu lingvo al alia, ĉu pro kialoj de elparolo, ĉu por konformiĝi al la naciaj ortografiaj kutimoj. En tiaj okazoj, esperantisto nur malfacile povas decidi kia devas esti la internacia formo en la internacia lingvo. Ĉi tie, oni apenaŭ povas dubi ke la angla vorto "television" bone reprezentas la internacian formon. Ĉar la intervokala *s* ne havas en la plej multaj eŭropaj lingvoj la sonon de la esperantlingva litero *s*, la formo kun *z*, do "televizio", verŝajne konformas plej bone al la ortografio de nia lingvo, kiel postulas la 15-a Regulo.

Cetere, la vorto "televido", se ĝi estus nature formita, havus tute alian signifon ol la internacia vorto. "Televidi" devus signifi "vidi ion je distanco (per rimedo de speciala aparato)", kaj "televido" signifus "la agon televidi", kiel "revido" signifas la agon revidi. La internacia formo "televizio", kontraste, signifas sistemon kiu ebligas la dissendon kaj ricevon de bildo trans iu distanco. Oni do povas paroli pri televizia ricevilo aŭ dissendilo,

Bonvolu Skribi

La *Revuo* presas senpage (sed foje mallongigas) korespondpetojn el aliaj landoj. Tiuj anoncoj aperas nur se, kaj kiam, konvenas al la redakcio (ĝis nun ni senprokraste presis ĉiujn, kies adresojn ni povis legi), kaj ili temu nur pri korespondado en *Esperanto*. Por certigi nepran aperon, oni pagu \$1 ĝis 4 paĝvastaj linioj. Se resendadreso ne estas legebla, ĝi estas nek presebla, nek presinda, do ne presota. SKRIBU KLARE!

MALLONGIGOJ: Dez., deziras; kor., korespondi; pk., poŝtkarto; bk., bildkarto; pm., poŝtmarko; gaz., gazeto; il., ilustrita; interŝ., interŝanĝi.

Johannes Uhlig, Zwickaŭ-Planitz, Aüssere Zwickaŭer Str. 34, Germanio. Dez. kor. per bk., interŝ. pm. kaj il. gaz. kun ĉiuj landoj.

Seccion Filatelica de Hispana Esperanto-Federacio, Apartado 875, Barcelona, Hispanujo. Dez. kor. kun nordamerikaj esperantistoj pri filatelio.

S-ro K. Moori, 78-2 Tutumi-cho, Minami-Hu, Nagoja, Japanujo.

“TELEVIZIO”

(el antaŭa paĝo)

ktp. La vorto “televizio” similas en sia internacia signifo la vorton “radio”, el kiu oni ne kutimas fari verbon. Povas esti ke “televizii” devus havi la signifon de la angla vorto “televise”, t. e. dissendi per televizio. En tiu okazo, la verbon oni devas konsideri kiel formita el la nomo, ne kontraŭe. Ĉe la vortoj “televidi-televido” la kazo estus mala, kaj tio substrekas la kontraston al la internacia formo.

Oni nepre ne supozu ke pro la fakto ke “tele-” aperas en kelkaj oficialaj vortoj kiel “telegrafo”, “telefono”, “teleskopo”, ktp., ke ĝi mem devas esti oficiala radiko, kun ekzemple la signifo “malproksima”. Telegrafo ja ne estas malproksima grafo, kaj telefono ne estas malproksima fono. Por rigardi la aferon el alia vidpunkto, oni konsideru la vortojn “pesimisto” kaj “pesimismo”. Kvankam “-isto” kaj “-ismo” estas oficialaj sufiksoj, la radiko “pesim-” tamen ne troviĝas en Esperanto. La principo do estas ke oni povas kunmeti oficialajn radikojn por fari oficialan vorton, oni ne rajtas dispecigi oficialan vorton por aserti ke la pecoj estas oficialaj. La parto de la 15-a Regulo kiu parolas pri “diversaj vortoj de unu radiko” ne estas aplikenda al la pecoj kaj eroj de internaciaj vortoj.

Alie ni devus enkonduki la tutan grekan lingvon.

La sopiro al “natureco” en la vortaro de Esperanto estas komprenebla, kvankam ne allasebla, simptomo de la socia maturiĝo de la lingvo. Ĝi korespondas al la lingva naciismo en aliaj lingvoj. Oni komparu la supre cititan formon “Fernseher” en la germana lingvo, apud “Television”. Tiaj naciismaj formoj ne enradikiĝis kiel anstataŭaĵoj por la internaciaj formoj en la germana lingvo, malgraŭ la klopodoj de la germanaj naciistoj, kaj simila tendenco tute ne taŭgas por internacia lingvo, kia estas Esperanto. La 15-a Regulo estas unu el la plej geniaj eltrovaĵoj en la Zamenhofa lingvosistemo. Ĝi faras Esperanton vere internacia lingvo, anstataŭ nura volapukaĵo. La principo de internacieco, apenaŭ trovebla en antaŭaj proponoj de internacia lingvo, restis la kerno de ĉiu propono post 1887, kiel pruvo pri la genio de Zamenhof. Se ni provus forigi la 15-an Regulon, aŭ malatenti ĝin, ni per tio garantius la venkon de Interlingua, kiu kaptis tiun solan principon el la zorge kunmetita Zamenhofa strukturo kaj volis apliki ĝin ĝis la ekstremo (sen sukceso, kompreneble).

S-ano GEORGO GABOR (733 W. 183rd Street, New York 33, N. Y.) mortis la 27an de Julio pro kormalsano, en la aĝo de 68 jaroj. Li jam de kelkaj jaroj konstante malsanadis k ĝuste je kelkaj semajnoj antaŭ nia 5a ELNA kongreso lia malsano tiel graviĝis, ke li devis enhospitaliĝi.

Li volontis akcepti la sekretarian postemon por la kongreso, kiam nia Loka Kongresa Komitato estis elektata. Kvankam jam tiam lia sanstato estis tre delikata, li energie k entuziasme servis en la kongresa posteno ĝis la enhospitaliĝo. Tiu malfeliĉo estis grava bato ankaŭ al nia kongresa komitato, ĉar ĝuste kiam ni plej bezonis lian kunlaboron, la nekuracebla malsano forrabis lin el ĉia porkongresa aktiveco. Kvankam nia 5-a ELNA kongreso pli brile sukcesis ol kiel kiu ajn el ni esperis, lia kontraŭvola elfalo el la porkongresa aktiveco k ĝia preparado estis treege sentebla. Eĉ en tre malforta sanstato li insistis ĉeesti — kiel pasiva observanto — tri kongresajn kunvenojn.

Li eklernis Esp-on — varbite de mi — en la jaro 1928, en Antwerpen, Belgio, kaj de tiam li restis fidela aktivulo por Esp-o, kaj ankaŭ membro-abonanto de UEA, ELNA, UL, NY-a Esp. Societo. Lia koro ripozu en paco.

Raportis *Ralph R. Bonesper*

Samideanoj! Helpu nin inter la militistoj usonaj en viaj landoj. Donacu lernolibron THE ESPERANTO TEACHER kaj nian NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW al la legejoj aŭ aliaj ejoj kie la soldatoj povas ilin vidi kaj legi. Se vi volas nin helpi tiel, bonvolu skribi al la sekretario de ELNA, Conrad Fisher, R.F.D. 1, Meadville, Pa., Usono. Se vi volas helpi sed ne povas elspezi la koston de tiuj du propagandaĵoj, tion diru en via letero.

VAGABONDS (Doneis' comment on trip)

Speaking of the language problem in Europe, we were told before we left America that we should experience no difficulty over there since nearly everybody speaks some English. This we can assure you, is more than a slight exaggeration; in fact it is a very distinct *fairytale!* If one patronizes the swanky hotels or frequents the ritzy bars, one usually finds an English-speaking hotel clerk or waiter. But when one bypasses the big hotels one is thrown on one's own resources linguistically.

In France and Italy we found a knowledge of German much more satisfying and serviceable than an effort to communicate in English. When Esperanto didn't suffice we used either German or Spanish.

Often we found English a distinct handicap because it immediately labeled us falsely as wealthy Americans ripe for the plucking.

In some countries English is extensively taught, but statistics in Hamburg are probably representative of conditions elsewhere, too; there, of the people who have spent five or six years studying English, only about five percent ever get to the point where they can do more than stammer a few words about commonplace things in a selfconscious manner.

It was always a painful experience for us when a proud parent would trot out a son or daughter and beamingly announce that he or she had studied English for five years. Almost invariably the young person would flounder around and grope for words or stand abashed and embarrassed and tongue-tied. It was pitiful to behold, and it made us want to tell them about how well Esperanto would serve them in a great many countries, and how much more easily they can learn it, (and in about one-tenth of the time!)

Paĝo de la Kunludantoj

HO, TIUJ ĴURNALISTOJ!

Brita episkopo renkontiĝis en Novjorko kun grupo de ĵurnalistoj. Antaŭ la vojaĝo li aŭdis, ke la usonaj ĵurnalistoj povas esti tre senhontaj. Tial li decidis esti eksterordinare singardema pri siaj eldiroj.

“Ĉu vi intencas viziti iujn noktajn klubojn dum vi loĝas en Novjorko?” estis la unua demando, kiun oni direktis al li. La episkopo bone pripensis antaŭ ol li malfermis la buŝon. Li tiam respondis: “Ĉu troviĝas noktajn kluboj en Novjorko?” La sekvantan tagon la gazetoj presigis la intervjuon: “La unua demando, kiun la episkopo faris, estis la jena: ‘Ĉu troviĝas noktajn kluboj en Novjorko?’”

Norvega Esperantisto

La mondo freneziĝis. La homoj estas psike malsanaj. Oni povas pri tio diri nur: “Kompatinda Dio, se estas vero, ke ni estas kreitaj laŭ Via bildo.”

La Vegetarano

Du lernantoj batas la trian sur la strato. Preterpasanto demandas: “Pro kio vi batas lin?” La knaboj respondis: “Pro tio, ke li neĝuste solvis problemon aritmetikan.”

“Ĉu pro tio vi rajtas koleri lin?”

“Jes, ni rajtas, ĉar ni ŝtelkopiis lian solvon.” *Bulteno de Esp-istoj en Pollando*

Fiŝisto sidas, enĵetinte sian fiŝhokon kun vermo en urban kanalon. Policano minacas al la fiŝisto: “Vi pagos punmonon, ĉar estas malpermesite kapti la fiŝojn en la kanalo.” La fiŝisto pravigas sin: “Mi ne kaptas la fiŝojn. Mi nur banas mian vermon.” La policano restas nepardonema. “Tamen vi pagu la punmonon, ĉar estas malpermesite ĉi tie bani sin sen vesto, kaj via vermo estas tute nuda.”

Bulteno de Asocio de Esp-istoj en Pollando

Jen vortkvadrato, kiu samas vertikale kaj horizontale:

K V A S T O N
V U L T U R A
A L M E N A Ŭ
S T E L E T O
T U N E L O N
O R A T O R O
N A Ŭ O N O J

Noho

ENIGMOSOLVO por la aŭgusta enigmo

Dolĉa nokto trankviligis
kampojn, urbojn kaj ĝardenojn,
kaj en dormo silentigis
homajn ridojn kaj ĉagrenojn.
Homojn lulas la gitaro
de la sonĝa forgesado.
En herbejo de l' kamparo
dormas grilo kaj cikado.

Edmond Privat

10 viktimoj, akcidento; 100 viktimoj, katastrofo; 1000 viktimoj, statistiko.

SAT-amikaro

Kuracisto: “Kiel vi fartas hodiaŭ?”

Paciento: “Jes, dankon, bonege.”

Kuracisto: “Tio ĝojigas min. En la lasta semajno vi ne fartis tiel bone.”

Paciento: “Ne. Vi ja scias, ke mi estas unuova ĝemelo, kaj mia frato kaj mi estis tute similaj. Mi devis ĉiam suferi pro tio. En la lernejo mi ricevis la batojn, kiam li faris malutilon. Kiam mi ekhavis enspezojn, li kvitancis por la mono. Kiam mi fianĉiĝis al bela fraŭlino, estis li, kiu edziĝis al ŝi.”

Kuracisto: “Tre bedaŭrinde, sen dubo!”

Paciento: “Jes, sed nun mi venĝis kontraŭ li. Ĵus mi mortis, sed lin oni enterigis,”

Norvega Esperantisto



OR RIMISTOJ

(POETOJ NE LEGU!)

JIM KAJ MI

Jim kaj mi amikoj estis ĉiam
depost en la mondon venis ni.
Ploron, plendon konis Jim neniam,
feliĉulo ĉiam estis li.

Feliĉega Jim!
malfeliĉa mi!
Ho pro la sukces'
vin envias mi.

Jim kaj mi ekamis inon saman,
nur al Jim ŝi dolĉe diris "jes".
Jim posedis, ho, belecon faman,
estus nur pri mi mensoga tez'!

Feliĉega Jim . . .

Post jareto mortis Jim, la brava,
heredaĵo estis nur vidvin'.

Kuŝas Jim sub foliaro flava,
la vidvino nun edzigis min!

Feliĉega Jim . . .

DEK BOTELOJ

Dek boteloj pendas de la mur',
dek boteloj pendas de la mur',
sed se akcidente falus unu nur,
tiam naŭ boteloj pendus de la mur'.

(Tiel laŭvice naŭ, ok, sep — ĝis du.)

Unu botelo pendas de la mur',
unu botelo pendas de la mur',
sed se akcidente falus unu nur,
tiam nur odoro pendus de la mur'.

(Ĉifoje mi ne prezentas verkojn de niaj propraj rimistoj, ĉar mi deziras tuj konatigi al la legantoj novan kantlibreton, "Jen la Kanto de l' Vojaĝ' ". Ni bezonas multe pli da kantoj — kaj da kantado. Se vi iom tediĝas pri ripetado de malnovaj favorataj, sendu 2 d. kr. al: Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando, ĝiro 16295 — aŭ mendu ĉe: Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.)

KŪRSA KANTO

Melodio originala de Carl Larsen

Ĉiu, kiu volas, povas!
Se babili vi nur provas,
helpa vento por vi blovas,
vigle vin antaŭen ŝovas
.;: dum la kursa tempo. .;:
Do vekigu nun, amiko,
kaj apliku en praktiko
lingvon plenan de logiko
kun la sono de l' muziko
.;: dum la kursa tempo. .;:
Jen, ekstaru, donu manon
flamigante ĉiun anon.
Faru propagandan planon
kaj kreskigu fratan amon
.;: dum la kursa tempo. .;:

KUNVENFINA KANTO

Nun estas ĝusta tempo por
ĉesigi la kunvenon,
kaj post la bona kunlabor'
ĝuadi dorman benon
kaj songi bone, bele pri
la venko de l' afero,
de la fratec', internaci'
sur tuta nia tero.
Adiaŭ nun, ho gefratar'.
Revenu ni en granda ar'
kun nova fort',
kuraĝ' ĝis mort'
en amo kaj en vero.

Nils Christensen

Jen kvar el kvindek kvin bonaj kantoj. Gajemuloj nepre lernu la kanton "Patro Noa", #18 en la libro. Tre vigla kanto. Mi lernis la originalon svedlingve, dum mi estis knabo (antaŭ tro da jaroj!), neniam esperis renenkonti la malnovan amikon. *fre*

Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in hats, *ĉ* as *ch* in church, *g* as in go, *ĝ* as *g* in gem, *ĥ* as *ch* in loch, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in azure, *s* as in so, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple, *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi, vi, li, ŝi, ĝi, si, ni, vi, ili, oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

-us; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those which the majority of languages have taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.

worth repeating...



The World
Needs
ESPERANTO
NOW

"The Sixth American Congress of Educators recommends to all teachers and professors the learning of the international language Esperanto, for its great usefulness for international relations."

*6th American Congress of Educators,
January, 1957*

The great worldwide organization to promote Esperanto
for people of all nations, all religions, all political beliefs
IS



Universala Esperanto-Asocio

The ONLY North American organization affiliated with UEA is
Esperanto League *for* North America

Every member of the League is a member of UEA

Why not Join Us Now?